Baltiaj Esperanto Tagoj
ŠIAULIAI

# SAGISTO

Redakcia retadreso: **ds@esperanto.lt**
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET43

ĈIUTAGA INFORMILO DE **BET-43** **N-RO 3** | 2007 07 16, LUNDO

## SOLENE INAŬGURITA BET-43!

Hieraŭ, la 15an de julio je la 17a horo ĉiuj partoprenantoj kolektiĝis en la ĉefsalono de la fakultato de sociaj sciencoj de Šiauliai Universitato por inaŭguri sian kunvenon.

En la enkonduka vorto la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas JEGOROVAS prezentis oficialajn gastojn kaj salutis la kunvenintojn. Oni voĉlegis salutmesaĝojn de la prezidanto de Litovia parlamento Viktoras MUNTIANAS, de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio d-ro Renato CORSETTI, de ĝenerala direktoro de UEA Osmo BULLER kaj de Ludoviko ZALESKI-ZAMENHOF.

Gratulparolis la alta protektanto de BET-43 urbestro de Šiauliai Genadijus MIKŠYS, la vicrektoro pri sciencaj aferoj de la universitato de Šiauliai prof. Vaclovas TRIČYS plene en Esperanto, la dekano de la fakultato de sociaj sciencoj d-ro Teodoras TAMOŠIŪNAS kaj Albertas LAURINČIUKAS nome de la pentristo Valerijonas GALDIKAS.

Sekvis paroloj de reprezentanto de Esperanto-klubo "Ruto", de Biruta ROZENFELDE – organizanto de la unua BET kaj de Latvia kaj Estonia reprezentantoj. Post la inaŭguro ĉiujn partoprenantojn akceptis la dekano de la fakultato.



**Surpodianoj de BET-43**



**Alta protektanto de BET-43 urbestro de Šiauliai Genadijus MIKŠYS**

**Partoprenantoj de BET-43**





**Vicrektoro pri sciencaj aferoj de la universitato de Šiauliai Vaclovas TRIČYS ricevis grandajn aplaŭdojn pro sia plena parolo en Esperanto.**

## Ekis diversnivelaj kursoj

Ja oni komencas sian Esperanto-vivon per lernado de la lingvo Esperanto kaj poste povas sin klerigi ankaŭ per Esperanto. Ĉi-jara BET aranĝis variajn Esperanto-kursojn, kiuj hieraŭ antaŭtagmeze komenciĝis en aŭditorioj de la dua korpuso. Estis rimarkite, ke multaj junuloj ĉeestas en lingvokursoj. Kuragiĝu tiujn junulojn.

Se vi sentas ankoraŭ mankon de Eperanto-scio, nepre kaptu okazon plu lerni Esperanton. Kursgvidantoj varme atendas vin.



**Kurson por komencantoj gvidas Stanislava SOBANSKA en aŭditorio 6.**



**Kurson por progresintoj gvidas Nina PIETUCHOWSKA en aŭditorio 8.**



## "Ruto levis esperon" lanĉita

Hieraŭ en aŭditorio 17 estis lanĉita la libro "Ruto levis Esperon". La libro estas dulingva (litove kaj Esperante). "Ruto" estas la nomo de la Esperanto-klubo en Šiaŭliai. La libron verkis Romualdas RUTKAUSKAS okaze de la organizita Esperanto-movado en Šiaŭliai. do, la 160-paĝa libro priskribas la Esperanto-movadon kaj la klubon. Aĉeteblas ĉe la Libroservo.





**La libro "Ruto levis esperon" (supre) kaj la aŭtoro prelegas (malsupre)**

**Kurson por komencantoj gvidas Stanislava ADOMAUSKIENĖ en aŭditorio 15.**



## Somera Universitato



Malfemiĝis hieraŭ la Somera Universitato per la prelego de Aloyzas GUDAVIČIUS pri "Verda koloro en litova lingvo". Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA admiris la Someran Universitaton, dirante, ke ĝi estas pli ampleksa ol en la baldaŭ okazonta UK en Jokohomo. Do ne maltrafu ŝancon klerigi sin en la Somera Universitato de BET-43.

Jen estas la listo de prelegoj por somera universitato:

1. Aloyzas GUDAVIČIUS . Verda koloro en litova lingvo.
2. Aloyzas GUDAVIČIUS. Genro kaj sekso en Esperanto.
3. Aleksander KORĴENKOV. Mi estas homo: pri la Zamenhofa ideologio.
4. Aleksander KORĴENKOV. Problemoj de la nuntempa Esperanto-gazetaro.
5. Petras ČELIAUSKAS. Lingvaj eraroj farataj de litovaj esperantistoj.
6. Petras ČELIAUSKAS. Esperantigo de beletra literaturo.
7. Jazeps ŠLARS. Baronino Bertha de SUTTNER – sekretariino de Alfred NOBEL.
8. Lydia LINDLA. Koloroj de Japanio.
9. Raita PYHALA Diapanoramo pri Laponio.
10. Raita PYHALA. Malnova sauno kaj saunokulturo en Finnlando.
11. Vytautas ŠILAS. Esperanto en Vilno ĉe la sojlo de XIX-XX jarcentoj.
12. Danutė KELIUOTIENĖ. Bona humoro kaj sano.
13. Zenonas SABALYS. Litova studenta Esperanto-movado dum 1956-1960.
14. Tuomo GRUNDSTROM. Pri la fenomeno literaturo en finnaj dialektoj.
15. Nijolė PETRAITYTĖ. Sekretaj vojoj de litova libro en la IX-a jarcento.
16. Peter BALAZ. Esperanto kaj interreto – facile kaj rapide.
17. Jevgenij GAUS. Reta projekto "Lernu".
18. Yves NEVELSTEEN. Komputiko.
19. Yves NEVELSTEEN. Vikipedio.

## KIO OKAZOS HODIAŬ

### 16an de julio (lunde)

| | |
|---|---|
| 09:00–10:00 | Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj<br>*Aŭditorioj en la unua etaĝo* |
| 09:00–10:30 | Somera universitato. Prelego de Aleksander KORĴENKOV "Mi estas homo: pri la Zamenhofa ideologio"<br>*Aŭditorio 17* |
| 10:30–11:30 | Baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo<br>*Aŭditorio 10* |
| 11:00–12:00 | Sezonoj / La Ondo de Esperanto sin prezentas<br>*Aŭditorio 17* |
| 12:00–14:00 | Tagmanĝo |
| 14:00 –15:00 | Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj<br>*Aŭditorioj en la unua etaĝo* |
| 14:00–15:00 | Somera universitato. Prelego de prof. Aloyzas GUDAVIČIUS "Genro kaj sekso en Esperanto"<br>*Aŭditorio 17* |
| 15:30–17:30 | Komunaj ludoj por BET-anoj. Gvidas Nora CARAGEA<br>*Aŭditorio 22* |
| 18:00–19:00 | Koncerto de flutistino Lidija GOMOLICKAITĖ-GRUDZINSKAITĖ<br>*Ĉefsalono* |
| 19:00–20:00 | Koncerto de ensemblo "Animo" el Liepaja gvidata de Austra PUMPURE<br>*Ĉefsalono* |

### Saluto al BET

Karaj Povilas Jegorovas, litovaj esperantistoj kaj ĉiuj partoprenantoj de BET, Mi salutas kaj gratulas vin okaze de la laŭvica sukcesa BET, tradicia kaj la plej grava esperantista evento de tiu vasta regiono. Mi deziras al vi sukceson dum BET kaj ĉiam! Amike

*Peeter Aitai*
(estona esperantisto en Liverpool, Britio)
http://peeteraitai.blogspot.com
http://groups.google.com/group/estonio
http://groups.google.com/group/maristoj

## Programŝanĝo

"Kvizo pri ĝeneralaj demandoj" okazos ne lundon, sed mardon je 15:00-17:00. Anstataŭ ĝi en aŭditorio 22 hodiaŭ je 15:30-17:30 okazos "Komunaj ludoj por BET-anoj", kiun gvidos Nora CARAGEA.

## Informoj pri la kvizo

Ni ludos en teamoj, tio signifas grupoj konsistantaj el du, tri aŭ kvar personoj decidos kune pri la respondoj al faritaj demandoj.

Tiuj demandoj koncernas plej diversajn fakojn / temojn, ekz. geografion, biologion, arton, historion ktp.

Inter ili estos ankaŭ kelkaj ŝercaj demandoj. Cetere ankaŭ la publiko rajtas partopreni, se la teamoj ne sukcesis respondi.

Do, venu akurate kaj multnombre por pasigi du interesajn kaj certe amuzajn horojn.

Eĉ ekzistas kelkaj modestaj premioj.

## Ne okazos

Koncerto de ensemblo de kantelistinoj "Ilga" el Riga ne okazos en ĉi tiu BET. Koncerto de "Animo" el Liepaja ne okazos sabate, sed hodiaŭ je 19:00-20:00.

## Trovu erarojn

En la subaj frazoj estas kaŝitaj 29 gramatikaj eraroj, po 1-3 en ĉiu frazo.

Ilin plej ofte faras litovaj esperantistoj (sed eble ankaŭ alilandanoj pekas same).

Se vi trovos ĉiujn 29 erarojn, via lingvoscio valoras 10 poentojn.

1. Marto havas tridek unu tagon, aprilo - tridek da tagoj.
2. Ni amas sian patrujon, samkiel vi la sian.
3. Li falis en flako kaj malpurigis pantalonojn.
4. Patrino ne unu fojon avertis la filon, sed li ne atentis ŝian konsilon.
5. Baltaj gentoj longe batalis kun atakantaj krucistoj.
6. Li parolis tiel nebule, ke neniu nenion komprenis.
7. Mi deziregis, ke okazus miraklo.
8. Kalkulante paŝojn siajn, ni la plej multe laciĝas.
9. Ripozi al ĉiuj bezonas, sed la plej multe - al nenifaranto.
10. Spegulon ne sufiĉas, ke vi sin povus vidi.
11. Mensogo prosperas, kiam ĝin kredas.
12. Testudo neniam nenien rapidas, sed ĉiam ne malfruiĝas.
13. Pli ol kvindek milionoj de homoj estis oferoj de la Dua Mondmilito.
14. Dekdu monatoj estas jaroj.
15. Al mi plej bezonas via konsilo.

Respondoj estos donitaj dum la prelego de Petras ČELIAUSKASeliauskas. La prelego okazos je 16:00-18:00 en la 19a de julio (ĵaŭdo).

## Bushoraro al kaj de BET-ejo

Nur buso kun numero 12 taŭgas por veturi al kaj de la BET-ejo. Tamen vi aldonu ĉ. 10-15 minutojn por haltejo proksime de via tranoktejo. La horaro estas por ekveturo en labortagoj. Nun oni ŝanĝas horaron, tial oni ne trovas la horaron en busŝaltejo.

**De la haltejo Kuršėnkelio žiedas al BET-ejo**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 07,45 | 07,55 | 08,05 | 08,14 | 08,24 |
| 08,34 | 08,44 | 08,54 | 09,11 | 09,28 |
| 09,45 | 10,01 | 10,17 | 10,32 | 10,47 |
| 11,03 | 11,19 | 11,34 | 11,49 | 12,05 |
| 12,21 | 12,36 | 12,51 | 13,07 | 13,23 |
| 13,28 | 13,48 | 13,58 | 14,08 | 14,18 |
| 14,28 | 14,39 | 14,49 | 14,59 | 15,09 |
| 15,19 | 15,29 | 15,40 | 15,50 | 16,00 |
| 16,10 | 16,20 | 16,30 | 16,41 | 16,51 |
| 17,01 | 17,11 | 17,21 | 17,31 | 17,46 |
| 18,02 | 18,18 | 18,34 | 18,49 | 19,03 |

**De la haltejo Dainų žiedas al la urbocentro**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 13,38 | 13,54 | 14,08 | 14,18 | 14,28 |
| 14,38 | 14,48 | 14,58 | 15,09 | 15,19 |
| 15,29 | 15,39 | 15,49 | 15,59 | 16,10 |
| 16,20 | 16,30 | 16,40 | 16,50 | 17,00 |
| 17,11 | 17,21 | 17,31 | 17,41 | 17,51 |
| 18,01 | 18,16 | 18,32 | 18,48 | 19,03 |
| 19,18 | 19,32 | 19,47 | 20,01 | 20,16 |
| 20,30 | 20,45 | 20,58 | 21,11 | 21,26 |
| 21,41 | 21,54 | 22,07 | 22,21 | 22,34 |

## El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn per retadreso: ds@esperanto.lt aŭ en la redakcia kaj la organizkomitata ĉambroj, kiuj troviĝas en la tria etaĝo de la dua korpuso.

Viaj raportoj, anoncoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj al la redakcio plej malfrue **je la 12a horo de la kuranta tago**.

Pro teknika kialo ne eblis skribi Esperantajn ĉapelitajn literojn en la dua numero, sed la problemo estas solvita. Ĉi numeron redaktis CHOE Taesok kaj Vida ČOJIENĖ.